# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc - Roussillon »

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN ☎ 34.22.18

JARA ABONO : 18 F C.C.P. 956-28 Montpellier

2-a Kvaronjaro 1984 N° 89

# Nia Federacia Kongreso en MILLAU

19-an kaj 20-an de majo

Konciza protokolo pri la ĝenerala kunveno.

Ĉeestis nur dudekkvino de gesamideanoj.
Jean Hénin (J.H.) "duma" federacia prezidanto malfermas la kunvenon kaj gvidas la debatojn kune kun Frederic Maurin (F.M.) elektita federacia prezidanto tamen nun for pro civila militservo.

J.H. alvokas al ĉies kunlaboro,ne nur flanke de la komitatanoj. Li jam vizitis kelkajn grupojn de la federacio pri kies agado li petas raportojn.raportetojn.

Sekvas vigla diskuto pri la prelegvojaĝoj planataj de U.F.E. Pluraj el la lastaj fiaskis: lastminutaj nevenoj pro diversaj motivoj dum la grupoj jam lanĉis invitojn kaj rezervis salonon,manko de taŭgaj diapozitivoj,kelkfoje la preleganto penas paroli en alia lingvo ol la esperanta k.s... Entute,tio-ĉi estas "malpropagando". Krome, pro troa rapido de la prelegvojaĝo sekvas laciĝo de la preleganto.

Se la ideo estas bona,ĝi bezonas esti polurata kaj,sen konkurenca deziro,ĉu ne povus stariĝi federacia intergrupa prelegturneo?

Alia demando estas, ~~bona,~~ ke kiam temas pri agado ĉe la ekstera publiko,kial neperi al plej diversaj surlokaj asocioj jam havantaj sian publikon,la inviton de franclingva E-preleganto (Piron,Janton,Duc-Goninaz, Albault ktp...) aŭ "la krizalido" (ĉe kulturdomoj,junulargastejej ktp...)?

Kio plej allogus la gejunulojn en niaj rondoj kaj aranĝoj? Plej simple estas demandi al ili. Tri adoleskantoj troviĝantaj en la salono apartiĝas por pridiskuti la demandon.

J.H. raportas pri la pozitiva rezulto de la federacia libro-servo. Kvazaŭ senprofite la mono estas reinvestita por plilarĝigi la disponeblan titolaron.

Je la reveno de la gejunuloj en la salono,Anne,el la kvartala grupo de Perpignan,aldiras ke,precipe,la gejunuloj deziras renkonti eksterlandanojn kaj havi iujn apartajn kongresajn aranĝojn. Estas do decidite:

1°/.- ke Brigitte Hénin estos peranto de la gejunuloj ĉe la federacia komitato.
2°/.- ke S-ino Négron animos apartajn aranĝojn por gejunuloj dum niaj renkontoj.

Ni deziru la plej grandan sukceson al tiu grava agado.

J.H. prezentas turisman kanvason,ĝuste pri Millau,por la planata turisma libreto. Jen ĝi,en tiu-ĉi kajero,kun peto de ĉies opinioj pri la eldonota libreto,kiu enhavos utilajn,kelkfoje ne alie troveblajn, informojn pri diversaj urboj kaj vizitotaĵoj de nia regiono.

Kvankam nepre necesaj,la diskutkunvenoj pri agado,funkciado ktp... ne allogas multajn homojn kaj ni devus precipe pensi pri novbakitaj esperantistoj. En niaj federaciaj renkontoj,jam de du jaroj,paroli nur en Esperanto ne plu estas nepra tiel ke ĉiu el la ĉeestantaro povu sin esprimi eĉ se li ne sufiĉe bone regas la lingvon.

Por la plimulto de la ĉeestantoj,la plej teda diskuto certe estis tiu kiu rilatis al "Sudfrancia Stelo" (S.F.S.).

Por ke pluvivu nia federacia ligilo laŭ la nuna sistemo nepre necesas ke samtempe ĉiuj jenaj kondiĉoj estu plenumataj:

- S-ino Soulier Ginette (215 Av. de Camargue,30230 Caissargues) ricevu la presotajn tekstojn kiel decidite dum la pasinta aŭtuna federacia laborkunsido en Sète pasintjare kvankam la protokolo ne estis presita en la oficiala formo (SFS N° 86-87).
- la anoj de la nima grupo presprete pritraktos la tekstojn.
- S-ro nur presos la bultenon akurate je lafino de ĉiu trimestro kaj sendos ĝin nur al abonantoj,kiujefektive pagis la abonon plus,kompreneble,al la laŭleĝaj adresatoj. Pri eventualaj interŝanĝaj sendoj ni diskutos poste. Momente nur validas la adresaroj trandonitaj de S-ino Négron.

Pago de (re)abonoj urĝas. De tio kaj de la apliko de la oficialaj decidoj de la federacia komitato kaj ĝenerala kunveno dependas la pluvivo de SFS.

Espereble tiu ĥaosa situacio estos definitive forigita por la ĉi-jara aŭtuna komitatkunsido,kiu,principe,okazos en la ĉirkaŭaĵoj de Beziers,ĉe tresimpatia S-ino Proud'hon,dimanĉon la 23-an de septembro, do unu semajnon post la esperantista E-semajno en Sète. La dato estas elektita tiel ke ni povu renkonti samideanon el Alaska,kiu trakuros la sudfrancajn kanalojn kaj tiam estos en Béziers.

Ĉar asocio de deportitoj petis de la nima urbestraro,ke unu el la urbovojoj ricevu la nomon de D-ro Salan,la federacia kongreso komisias la Niman E-kulturcentron por ke ĝi petu de la urbestraro ke ankaŭ la epiteto "esperantisto" estu sur la koncerna strattabulo. Ja,D-ro Salan, esperantisto de 1924,estis aktiva prezidanto de la nima grupo kaj federacia komitatano,kiam li mortis. Povante pretendi je multaj honoroj pro homama publika vivo,ĉe le ĉerko,li nur volis kaj havis la lastan publikan saluton de deportitoj kaj de la esperantistoj.

Jam de du jaroj ekzistas la lingvostaĝo en Valras. Ĝi pludaŭros.

La federacia financa situacio,kiun ni legos aliloke,forte suferas pro la reeĥo de la nuna SFS-a balasto.

Ĉar finiĝis la komitatmandato de niaj geamikoj Raynaud,Volpelière,Deligne kaj Négron,ni notas,ke la du unuaj rekandidatiĝas(al ili iru niaj dankoj pro la de multjaroj farita laboro).

S-ino Négron kaj S-ro Deligne estas reelektitaj dum la federacian komitaton eniras : S-ino G. Soulier (adreso liniojn antaŭe) kaj S-ro André Rocher 2,rue Méjane, 125000 Espalion.

Nova interplektiĝo de ideoj spruĉas je la propono,ke nia federacio sugestu instigi UFE (tra la landa kongreso en Bourges) subteni la deklaracion,kiun alprenis SAT-Amikaro dum sia propra kongreso en Draguignan,je Pasko,koncerne la ĝis nun kvazaŭ forgesitaj leĝotekstoj de la socialista partio por la nedeviga enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

J.H. prezentas la novan asocian informilon de UFE kaj esprimas la deziron,ke nia venontjara federacia kongreso okazu ie sur la sojlo de la Gard-departementa federacio,kio estas principe konsentita.

Li estos nia reprezentanto ĉe la kongreso de UFE en Bourges.

protokolis Jean Amouroux.

UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO. Communiqué

GK/NK/840610

Les participants au 76ème congrès de l'Union Française pour l'Espéranto,réunis à Bourges du 8 au II Juin I984,

contatent avec satisfaction la progression régulière de la langue internationale Espéranto dans de nombreux pays et organisations spécialisées,

souhaitent le renouvellement de la proposition de loi de l'Assemblée Nationale en faveur de l'introduction de l' Espéranto comme langue à option dans les écoles françaises,

regrettent l'absence,dans le cadre de la construction européenne et des eorganisations internationales,de toute politique l linguistique efficace et respectueuse des langues et cultures "minoritaires" (langues nationales de moindre diffusion,régionales ou des travailleurs immigrés),

soulignent les problèmes que posent aux instances européennes l'utilisation obligatoire des sept langues officielles,

encouragent les propositions du groupe pour l'Espéranto au parlement Européen et invitent les élus français à lui apporter leur soutien.

LINGVO STAĜO en VALRAS


Organizita de la Grupo de Beziers, ĝi okazis fine de aprilo ĝis la 1a de majo. La staĝanoj komencis alveni sabaton 28an de aprilo en "Centre Socio-culturel de Valras". Ni disponis pri tri ĉambroj, do estis eble starigi tri kursojn, kiuj okazis matene kaj posttagmeze. Dimanĉon pluraj Perpinjanoj aldoniĝis al la staĝo. S-ro Llech-Walter prelegis pri "Unu bonfaranto de la Homaro: la D-ro L.L. Zamenhof". Post la vespermanĝo estis prezentitaj filmoj, ankaŭ du skeĉoj de Raymond Schwartz, enscenigitaj kaj dekoraciitaj de Jean-Pierre Péray, la klubanaj aktoroj tiel ridis kiel la spektantoj! Poste ĉiuj partoprenis kantojn kaj ludojn.La mardo 1a de majo estis okupita de la ekzamenoj: ses kandidatoj por la unua grado, du por la dua: ĉiuj sukcesis. Entute, la tagoj estis plenplenaj de laboro, kvankam ne sufiĉe laŭ la staĝanoj! La loko kaj ejo ŝajnis taŭgaj, kaj ni antaŭvidas organizi novan staĝon en 1985, denove en Valras, verŝajne nur du tagojn, je la fino de semajno, sed kun pli longaj studoj.

GRUPO de BEZIERS

Kiel kutime la lasta kunveno de la jaro okazis ne en la klubejo, sed en la jardeno de grupaninc, ĉe kamparo, ĉirkaŭ tablo surmetita per ĉerizoj, kukoj kaj de la "sangria", sub bela suno. Eĉ malstreĉaj, la klubanoj laboris pretigante la venontperiodan agadon. La klubanoj havos eblecon kunveni dufoje monate, alterne sabaton kaj mardon; tio ebligos la ĉeeston de ĉiuj, laŭ sia libero, junuloj laborantaj kaj emeritoj. Ciuj estos petataj prezenti paroladeton, laŭ libervola temo, sekvita de komuna debato. Plie, daŭros la studo de verkoj. Aliflanke, la grupo reklamos kaj informos pere de la regiona gazetaro, ankaŭ ĝi provos eneri la culturaj junularaj centroj, kaj la lernejoj publikaj kaj privataj. Okazos la kutimaj eventoj: Zamenhofa festo (16an de decembro), festo de la krespoj (en februaro), ankaŭ, kompreneble, la kursoj en Béziers kaj, se eble, en proksima vilaĝo.

# MILLAU

pronon̈ci Mijo



Je 125 Km norde de Béziers (pr.Bezie)
Urbo de la ganto kaj de la ledo
Proksime de la Kanjonoj (riveroj Tarn, Jonte),
de la altebenaĵoj "Causses" (pr;kos) kaj kavernoj.

*****

Subprefektejo kun 24 000 enloĝantoj, sur la nacia vojo N9
kaj fervojo Paris-Béziers.
Gastronomiaj [redacted] :specialaĵoj "fouace" =pr.fuas kaj "trenels"
kuko kaj farĉitaj ŝaftripoj


Bone provizita je hoteloj kaj tendumejoj
Kun siaj ruĝaj tegmentoj, tiu vigla urbeto estas por veturantoj el Nordo la unua rideto de la Sudo. Ankaŭ turism-centro .Adreso de la turism-oficejo:
Avenue Alfred Merle -Poŝtkodo 12100 Tel (65)60-02-42

*****

Dum la Romia okupo, Millau estis fama centro de potistoj (restaĵoj videblaj en "La Graufesenque", sude de la urbo kaj en la muzeo). La fromaĝo de Roquefort (pr.Rokfor) estas la alia famo de tiu regiono. La granda bezono de ŝafin-lakto necesigas la buĉoferon de la ŝafidoj. Pro tio la prilaborado de la feloj (speciale por gantoj, vestoj...) okupas multajn homojn. La konkurenco de la artefaritaj gantoj minacas tiun industrion. Pli freŝdate la disputo inter la kamparanoj de la altebenaĵo Larzac (pr.Larzak), sude de la urbo, kaj la militistaj instancoj, kiuj intencis pligrandigi trejnkampon, solviĝis favore al la unuaj. "Eko-muzeo", en La Jasse sur la vojo N9 (tel.60-43-58) priskribas tiun lukton kaj la naturan medion.

*****

Elstaraj eventoj de la jaro: foiro de la mineraloj (Julio), 100km piedirado (fine de Sept)
Por pliaj informoj pri Millau kaj ĝia regiono, sin turni al la plej proksima
Esperanto delegito: Jean Hénin 48500 La Canourgue
tel (66)32-86-36






MILLAU + TURISM-CENTRO + Kelkaj eblecoj por ekskursi

La ciferoj rilatas al la plano de la urbo sur la antaŭa paĝo


1: Kanjonoj de la riveroj Tarn kaj Jonte; vidu apartan rubrikon.

2: Montpellier le vieux (iro kaj reveno : 35km). Ne temas pri malnova urbo sed pri ĥaoso de rokoj kun strangaj formoj. Eviti tiun ekskurson iun sunan posttagmezon.
Biletoj ĉe "Ferme Maubert" (restoracio).
La irvojo por promenantoj estas bone indikata ( daŭro: 1h aŭ 2h laŭ elekto)

3. La jena ekskurso ankaŭ konvenas por tiuj,kiuj vojaĝas suden kaj preferas pitoreskan vojon. Laŭlonge de la valo de la rivero Dourbie (pr.Durbi),vi preterpasas vilaĝojn sur krutaĵoj (St véran, Cantobre). Surprizo atendas vin en La Couvertoirade (pr. Kuvertoarad),vilaĝo kie la Templanoj konstruis kastelon en la 12a jarcento kaj kiun la Hospitalanoj (ordeno de la 14a jarcento) fortikigis poste.
Similaj konstruaĵoj troviĝas en aliaj vilaĝoj de la sama altebenaĵo Larzac (Ste Eulalie de Cernon, La Cavalerie...)
En Le Caylar (pr.Kelar),entute 53 km de Millau, la rokoj similas la turojn de iu kastelo super la vilaĝo. Tie oni retrovas la nacian vojon N9,ĉu por veturi al la Sudo,ĉu por reveni al Millau (42km) tra monotona altebenaĵo,haltante ĉe la "Eko-Muzeo".

4. Roquefort: vizito al la keloj de la fama fromaĝo (23 km de Millau)
Legendo rakontas, ke iu paŝtisto, allogita de iu ĉarma paŝtistino,lasis en groto pantranĉaĵon ,kovritan de fromaĝo kaj retrovis ĝin poste...ŝanĝita,ŝimita...sed bongusta. La vilaĝo estas konstruita sur falaĵoj de rokoj; erozio kaj la laboro de homo pligrandigis la fendegojn kaj tiel naskis la kelojn, bone ventumataĵn.
Vizito eblas:-tutjare ĉe "Société" tel.60-23-05; somere ĉe "Papillon" tel.60.90.03
Plej interesa sezono : printempo.
Kelkvorte: En la kazeiĝintan lakton de ŝafinoj estas semata fungo-polvo (penicilio rokforta). La salita fromaĝo maturiĝas dum pluraj monatoj,bluaj vejnoj aperas...

5. Por la amantoj de boatoj, veltabuloj,fiŝkaptado...la lagoj de Pareloup,Pont de Salars, ktp estas allogaj; en Pont de Salars,ĉiujare en Aŭgusto,renoma folklor-festivalo.



S-ro Carrey,Moŝmoŝta Prezidanto de la Nima Grupo (la deĵoranta tajpanto...) ne estas tajpisto... Vi do bonvolos korekti vi mem la multnombrajn erarojn kiuj donas tiom da plezurojn al la tikletaj leĝleglekantoj.
S-ro Carrey,Moŝ...(kvankam li estas ĉiam kaj ĉiam pli bela...) kumpas pri la malakurateco de la fama SFS... li ne havas tajpipilon kaj devas prunte ŝteli en sia kolegio tatajpipilon. Pardodonu!

Niaj receptoj kaj sugestoj!

La Kefiro de Sinjoro TOURON

La fermentilo ne estas sama kiel tiu de jogurto: oni ne devas varmigi ilin,ili ne estas mikroskopaj,kaj oni devas repreni ilin tra kribrileto por venonta uzo. Lakto restas kun siaj "zoogleoj" dum unu,aù du aù tri tagoj,laù nia gusto,je temperaturo normala; oni kribras la zoogleojn,poste oni lavas ilin,kaj denove oni nutras ilin per lakto, aù oni lasas ilin dum unu ĝis dek tagoj en akvo,se oni ne deziras havi tuj denove KEFIRON.


La norda Staĝo por.......... 27-28 oktobro en Courbon. Auvergne.

Toulouse: staĝo en Valras. Komence de Junio
30 sept. Excursion à Albi
15 Nov. Prelegoj. Albi
4 Nov. Vizito de Toulouse.

Lastmomente: Profesoro Pierre Janton konsentas viziti nian federacion!

Sudrodana Rendevuo de "Literatura Foiro" en Avignon
la 27an kaj 28an de Oktobro I984.

OKAZE DE LA SOMERAJ FERIOJ NI ANKORA% ESPRIMAS NIAJN SINCERAJN BONDEZIROJN AL CIUJ NIAJ LAGANTOJ KAJ SIMPATIANTOJ. BONAN KEFIRON!!!



Nova libro de Montpellierano : "TIEL DIRU"

Vi certe jam konas kaj uzas "Kiel diri" de la sama aŭtoro(L. Lentaigne) ĝi entenas 5000 esprimojn en 67 ĉapitroj,laŭ la principo de asociado de la ideoj (la libro estas tute en Esperanto)

Ĵus aperis ĝia frateto "TIEL DIRU",pli speciale por franclingvanoj,kiu celas"krei ĉe la uzantoj la bezonon uzi tutpretajn vortkonstruojn kaj tiel helpi ilin atingi fluan parolkapablon laŭ vere Zamenhofa stilo".

Ekzemple dum diskuto kun persono,kiu laŭ vi troigas,sub rubriko"exagérer",vi trovas: "fari el muso elefanton,taksi iun pli alte ol kion li meritas"...

Se li/ŝi respondas,ke li/ŝi ne troigas,sub la rubriko "vérité",li povas trovi: "diri la puran veron/ mi diras al vi nenion alian krom plej pura vero/ diri la veron malkaŝe,senŝminke (sans fard)" kaj plurajn aliajn esprimojn.

Tiu libro ne povas,kompreneble,esti kompleta sed ĝi estas malmultekosta (20f-vendata de la Federacia libro-servo),utila komplemento al "Kiel diri" (entute pli ol 8000 malsimilaj esprimoj) do ne malhavebla por ĉiu serioza Esperantisto.

TURISMO

Por gejunuloj: 27-31/7 Internacia Junulara Renkontiĝo en Villandraut apud Bordeaux (Junulfako de SAT)

I2-19/8 Fran-germana Semajno por gejunuloj. Le Havre (organizata de Jefo) Temo: malŝato inter popoloj
Kotizo : 270f ĝis 20 jaroj, 300f ĝis 25J, 360f por la aliaj. Tiu prezo inkluzivas loĝadon,manĝojn,KTP...

En nia federacio: La kutima semajno de Sète en Septembro. Informas. Y Vierne

ĉe niaj najbaroj: La semajno de Nice,je printempo 85(vidu la anonceton)
7-12 Julio: Hispana kongreso en Seiljo
17-19 Aŭgusto: Andaluza kongreso en Malaga

Elsataras: Greziljono(vidu la eltranĉaĵon kun programoj)
La Chaux de Fonds je la alteco de II00m en la svisa Ĵuraso.
Tie la Kultura Centro Esperantista,kies formulo estas "studi feriante"
Kursoj matene,ekskursoj posttagmeze 7 domojn,ĉiu entenas 51oĝejojn

La nova internacia Esperanto kursejo en Pisanica(Bulgario), en la Rodopi montaro estas malfermata la tutan jaron ,do vere unika...
Restadoj: 1 aŭ prefere 2 semajnoj.
Ebleco pasigi unu semajnon en Varna ĉe la Nigra Maro kaj unu semajnon en Pisanica.
Kelkaj menciindaj datoj: 21-30/8 ~~kursoj~~Korusa Esperanto Renkontiĝo
1-20/7 kaj 1-20/8 Kursoj por instruistoj
2 semajna restado kostas proksimume 1500f.

**VILANOVA I LA GELTRÚ 1-8 JULIO**
**(Garraf) 1984**

**1A INTERNACIA KATALUNA**

**ESPERANTISTA FERISEMAJNO**

BONVOLU REAGI KAJ DISKONIGI EKSTERLANDEN

Je la fino de 1985, RTL /Luksemburga Televido/.elsendos per satelito kaj eblos kapti ĝiajn programojn en dudeko da eùropaj landoj.

Nun la estontaj programeroj estas pritraktataj.

Sekve estas tempo por SENPROKRASTE kaj AMASE sugesti al la RTL-estraro regulan programeron ankaù en Esperanto, ĉu monate, ĉu eĉ semajne.

SENPROKRASTE ĉar estos tro malfrue, kiam la programeroj estos elektitaj.

AMASE ĉar nur mulnombra reago povos influi decidon. Ni ne forgesu, ke televida programo ne indas por deko da personoj.

Bonvolu proponi tion afable per individua aù per kolektiva letero, kiun ankaù amikoj de Esperanto povos subskribi. Uzu preferinde la francan, germanan aù anglan (eĉ malbone); tamen bonvenos leteroj skribitaj ankaù en aliaj eùropaj lingvoj.

Diskonigu per bultenoj, cirkuleroj, fotokopioj, ktp. . Niaj leteroj inundu la labortablon de la RTL-Direktoro,

Villa Louvigny,
Luxembourg.

P.S. - Neniu vera samideano rifuzos kunlabori!

**MEMORINDA DATO :**

**Dimanche 23 septembre rencontre chez Madame Irma Proud'hom**
**114 , Rue de l'Aniel , 34370 Maraussan par Cazouls les Béziers.**
**(A droite au début du village en venant de Béziers. Face à l'agence Puissant )**

**- 10h réunion du Comité.**

**- 12h pique-nique avec un espérantiste americain et sa famille (9 personnes)**

**- Apportez son repas , unue couverture et éventuellement quelque chose de typique pour faire goûter à nos amis**

**- Après midi excursion au Colombier , au bord du Canal du Midi , et à Ensérune.**

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon
**Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES**
Dépot Légal : 2ème Trimestre 1984

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes